

Kajeroj **el la Sudo**



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



KAJEROJ EL LA SUDO

Bulteno de Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE)

Prezidanto:
Manuel López Hernández

Sekretario:
Fco. A. Antúnez Romero

Kasisto:
Tomás Caspe Cereijó

Sidejo:
Str. Sol, 75
E-41003 Sevilla (Hispanio)

Redaktoroj de la Bulteno:

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe, 26, 1ª.
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Miguel Fernández Martín
Santa Genoveva, 58
28017 - Madrid (Hispanio)

Kovrilo: desegno de A. Machado

ENHAVO :

Nur marŝante oni faras vojon	3
"In memoriam" : A. Machado	4-5-6-7-8
Bonvolu ridi... Sed ne tro	9-10
La lasta lekcio de Unamuno	11-12
Diversaĵoj (anoncoj)	13
La movado en Hispanio	14-15-16
Dokumentoj el pasinto	17-18
La konspiro de silento en UEA	19-20
Abonprezoj	21
Ekster Iberio	22-23

Nur marŝante oni faras vojon...

Jen ni denove antaŭ vi, komarado (ino), bona kompano nia. Jes, ni iom malfruis, sed kreu min, ni tute ne kulpas: ni jam anoncis al vi, sufiĉe antaŭtempe, ke financi nian gazeton restos ĉiam nia konstanta defio, ĉar la nombro de nia anaro ne estas alta, kaj sekve niaj monrimedoj liliputaj por niaj bezonoj...

Ni ja ne scias almozpeti, sed devo nia estas, prezenti al niaj legantoj la kaŭzon de niaj problemoj: ni sendas pli ol la duoblon de nia eldono al ne-membroj, ni do bezonas novajn abonantojn, ĉar ni tute ne volas rezigni pri nia malavara sinteno.



Cetero, en nia dua paŝo ni volas speciale omaĝi la elsteron figuron de la granda hispana poeto Antonio Machado okaze de la kvindeka datreveno de lia forpaso en Collioure, suda Francio, ekzilita post la malvenko de la hispanaj respublikanoj en la civila milito 1936-39, de ĉi numero de nia modesta revuo precipe emfazos lian poezion, kiu rangas inter la plej elstaraj de nia epoko, kaj substrekos la ne sufiĉe konatan dimension (almenaŭ internaciskale) de la homo de "la intimaj emociaj lirikaĵoj solecoj"...

Filozofieme, Antonio iam verkis poemeton, kiu tre rapide famiĝis kiel prava aserto pri ferenda tasko, ĝi esence diras, ke "vere ne ekzistas vojo, nur marŝante oni faras ĝin". La poemeto tekstas:

Vojmarŝanto, viaj spuroj
estas nur la sola pado.
Ne ekzistas voj', marŝanto,
nur kiu feras la paŝon.

Marŝanto vi feras padon,
kaj rigardante post vi,
oni perceptas kun klare
vojon sen ebla reir'.

Ne ekzistas voj', marŝanto,
nur holsulkoj sur la marol

Redaktante la duan-trion numeron de "Kajeroj el la Sudo" ni intencas "nur fari vojon" en nia tasko, kiel talenta iam proklamis nia honesta granda poeto.

In memoriam: Antonio Machado Ruiz

Antaŭ kelkaj semajnoj, la 22an de Februaro, ĝuste la saman tagon antaŭ kvindek jaroj, forpasis en Collioure, apud-mara vilaĝeto sudfranca, la hispana poeto Antonio Machado Ruiz. Li estis tia alveninta la 27an de Januaro kun multaj aliaj batalantoj kaj fideluloj al la hispana respublika kaŭzo venkita, do lia ekziliĝo apenaŭ daŭris ne unu monaton.

Antonio Machado naskiĝis en Seviljo, la ĉefurbo de Andaluzio, en 1875, sed translokiĝis baldaŭ al Madrido kun la tuta familio, kiam li estis nur okjara, tuj post ol lia avo estis akceptita kiel katedra profesoro en la Centra Universitato.

Li edukiĝis en la Institucio pri Libera Instruado, prestiĝa pedagogia lernejo fondita en Hispanio (1876-1939) de kraŭsismaj profesoroj, kontraŭaj al la instrumentodoj uzitaj tiam en la oficialaj medioj. La nova ŝtata lernejo celis modernigi la hispanan socion per la edukado.

Baldaŭ la juna Antonio montris sian inklinon pri beleto, specialan kapablon por literaturi kaj komencis kunlabori en fakaj revuoj. Lia poezio estas, esence, simple, kaj lia metriko spegulas preferon por la rimo asonanca. Li penetrigas siajn versojn per ĉarma melankolio kaj profunda emocio, kaj forigas el ili ĉiajn ornamajn elementojn kaj brilajn metaforojn. Oni povas diri, ke li atingas idealon pri poezio, konsistantan en ĝia prezento nuda je pitoreskaj rebriloj, montrantan per apenaŭ percepteblaj rimo kaj ritmo la belecon de la konceptoj, kiujn li volas esprimi.

Jen unu el la poemoj klare montranta la karakterizojn menciitajn:

Nokte, kiam mi dormadis,
mi sonĝis, revo fikci'l
ke fontaneto ŝprucadis
en la korintern'de mi.

Tra kiu kaŝa kanalo
vi venas, akv', tien ĉi,
font'de nova ekzistado
ne gustumita de mi?

Nokte, kiam mi dormadis,
mi sonĝis, revo fikci'l
ke abelaron mi havis
en la korintern'de mi,
kaj l'orkoloraj abeloj
tie fabrikis kun (l)zel'
vakson kaj dolĉajn mielojn
el la malnova tristec'.

Nokte, kiam mi dormadis,
mi sonĝis, reva fikci'!,
ke ardanta sun'lumadis
on la korintern'de mi.
Ardanta, Ĉar ĝi brulumis
kun la varm'el propra dom',
ostis sun'Ĉar ĝi prilumis
kaj incitadis el plor'...

Nokte, kiam mi dormadis,
mi sonĝis, reva fikci'!,
ke propra diŝo sin kaŝis
on la korintern'de mi.

La poemoj sen retoriko de Machado montras ankoraŭ intimisman poezion; li konfesas: "mi ĉiam konversacias kun la homo en mi mem akompananta", cetere, li filozofias pri si mem kaj konstante dialogas kun sia epoko, kun ĉiuj elementoj, kiuj lin ĉirkaŭas: kun la fontano, kun la aŭroro, kun la vento, kun la nokto, kun la ulmoj kaj precipe kun sia koro... kiel en tiu ĉi poemo:



Antonio Machado, poeto.

Estis certa nokt'de Majo
obskurblua kaj serena.
Sur l'akuta cipresalto
brilis la luno plenplena
lumigante la fontanon
el kie l'akvo luddancis
intertempan ploran kanton
nur el ĝi oni aŭdadis...

Poste, aŭdiĝis l'akcento
el kaŝita najtingalo...
Skue rompis forta vento
l'akvokurbon de l'fontano.

Kaj mildega melodio
la ĝardenon orarvagis,
inter mirtoj, muzikisto
la violonon ludadis.

Estis akorda lamento
el juneco kaj el amo,
por la luno, por la vento,
por najtingal'kaj por l'akvo.

La ĝarden'hasas fontanon,
kaj la fontano ĥimoron...
Voĉ'aŭdiĝis dolorkanton
animon el printemp-ĥo.

Mutiĝis la voĉ'lamenta
kaj el violon'la ritmo.
Vagis nur melankolio
tra la ĝardeno silenta.

Aŭdiĝis nur melodio
el la fontan'kapricema...

Cetere, li ne emia frekventi kunvenojn, nek la bruon societan vivon de la tiamaj poetoj, bohemiaj kaj artistoj: modesta,

sincera kaj ĝisfunde honesta, li sentis la belecon de la longaj silentoj, la emocioj de la intimaj solecoj, la profundan alrigardon de interna mondo plena de lirikaĵoj oĥoj, kiuj pli bone respondis al lia koncepto pri poezio, kiun li difinis kiel "profundan tremetblovon de la spirito"...

Kiam Machado estis 24-jara, li alvenis unufoje al Parizo, kie li laboris dum kelkaj monatoj en la eldonejo Garnier, tempo, kiun li profitis por interkonatiĝi kun elstaraj intelektuloj tiuepokaj: Pio Baroja, Gómez Carrillo, Oscar Wilde, Joan Moragas, k.a., sed post kelkaj monatoj li revenis al Hispanio por daŭrigi siajn studojn kaj ne post longe publikigis siajn poemojn en la modernisma revuo "Electra" apenaŭ ĵusfondita.

En 1902 Antonio Machado vizitas duafoje Parizon, kie li konatiĝas kun la fama sudamerika poeto Ruben Dario. Ambaŭ poetoj tuj intersimpatias, kaj Antonio verkas balon: poemon omaĝa al Ruben esprimante sian admiron "al tiu nobla poeto, kiu aŭskultis la vesperajn eĥojn kaj la aŭtunajn violonojn de Verlaine"...

Ruben respondis la omaĝon pentrante per neimitablaj versoj fidelan portreton de Antonio. Mi ne povas eviti la tenton reprodukti por vi la poemon, ĉar per tiaj versoj vi perceptos pli trafan bildon pri Antonio, ol se mi skribus paĝojn kaj paĝojn. Ruben desegnis tiel la portreton:

Silentema kaj mistera
li iris kaj reo venis.
Lia rigardo sorona,
tiel profunda aspektis
ĝis ĝi iĝis nevidebla...

Li parolis kun akcento
de hom'timema fiera,
kaj la hol'do lia penso
lumis tiel perceptebla,
ke oni sentis l' impreson
vidi en la kap'pansema
brulantaj siajn ideojn
de brila homo bonega.

Certo, li paŝtus leonojn
kun ŝafoj en harmoni'.
Li same kondukus ŝtormojn.
aŭ mieron ĝis la fin'!

La plezurojn de la amo
kaj mirindaĵojn el viv',
li kantis per versoj belaj,
kies sekret'gardis li.

Rajda sur rara Pegaz'
li venis al infinit'.
Mi preĝas por Antonio
la dioj ja gardu lin!

Je la fino de la ĵus indikita jaro, nia poeto publikigas sian unuan verkon "Soledades" (Solecoj), pri kiu Juan Ramón Jiménez diris: "Libro de aprilo, amara kaj blua, plena de karesantoj brizoj, de fontomuzikoj kaj aromoj liliaj. Por ke nia spirito alproksimiĝu al Okcidento karesata de tiu ĉi liro, kiu havas la tutan antikvan melankolion kastilian de la koploj de Don Jorge Manrique kaj la belan ritmon riĉan kaj diamantan de la romanoj de Gongoro".

La vivo de Antonio vibras en la intima kolokvo de siaj versoj: pri ĉiu momento kiun li vivis oni trovas signifoplenan versajon kantante ĝin...

"Mia infanaĝo estas, hela korto sevilja
kaj klara horto, kie citrono maturiĝas.
Mia juneco, dudek jaroj sur ter' kastilja;
mia viv', kazo, kiujn mi plaĉe ne eksplikas...

Kaj kiam forpasis lia profesoro, la fama pedagogo Francisko Giner de los Rios, gvidanto de la Institucio pri Libera Instruado, kie li studis, Machado dediĉas al li kortuŝajn versojn:

Forpasis en l'oktagiĝa lumo
nia kara, la Majstro amata,
kiu imagis por Hispanujo
klerigon kaj reŝanĝigon grandan.

Alportu lian korpon al suno!,
amikoj, al la montaro alta,
al la montoj kun verdoj kaj bluoj
de l'ampleksega Guadarrama,
kie en la abismoj sen fundoj
la verdaĵ pinaroj rave kantas...ktp.

Pri la travivaĵoj de Antonio Machado en Soria, la plej intense vivitaj en la ekzistado de la poeto, li verkis multenombrajn poemojn, kiuj plenigas ĉiujn Antologiojn de la moderna hispana Poezio, sed la forpaso de la amata edzino, la juna Leonor, estis terura bato por li, tiel drame sentita, ke li eĉ intencis mortigi sin, kiel letore li konfesis al sia amiko Juan Ramón Jiménez, sed en sama letero li aldonis: "se ian forton mi havas, mi deziras profiti ĝin, estas ja necese defendi tiun Hispanion ŝprucantan kontraŭ la mortinta maro de tiu alia Hispanio inertia kaj pasiva, kiu minacas dronigi ĉion", ... sed li ne povis eviti rememori dolorajn scenojn de l'pasinto kaj la amatan edzinon, kaj donove la versoj esprimis tiujn suferojn, kiam li skribis:

Iun someran nokton varman,
aperta estis la balkono,
samkiel en la nokto ĉarma
estis la pord' de mia domo.

En mia dom'venis la morto
sen atentigi per rigordo
ion rompis en sia korpo
per la fifingroj de la mano.

Piedŝovo, sen min rigordi,
antaŭ mi repasis la morto,
mi koleris: kion vi faris?
La morto ne donis respondon.

Mia infanin'paco restis,
mi sentanta akran doloron,
ho, va! kion la mort'ja rompis
estis ligil'de niaj koroj...

Sciola pri Ĉio, kio koncernas la scion, Machado studis
filozofion kiel lernanto en Parizo de la famaj profesoroj Bergson
kaj Bedier, kaj en Hispanio doktoriĝis pri belotro kaj filozofio.
Dum multaj jaroj li instruis la francan lingvon kiel gimnazia ins-
truisto.

Fidela al la idealo demokrata, kiun li ensuĉis infano-
ĝe en la Lernejo pri Libera Instruado, li neniam ĉesis strebi al po-
polaj aspiroj: li estis unu el la malmultaj respublikanoj, kiuj hisis
la trikoloran flagon en la urbodomo de Segovia ĉe la alveno de la Dua
Respubliko en 1931. Li kunlaboris ofike en la fonda de Popola Univer-
sitato en Segovia, organismo neoficiala kroita por eduki nur laboris-
tojn, kaj fine, dum la civila milito li batalis per sia plumo defen-
dante demokration, en Madrido, en Valencio, en Barcelono, ĝis la fino.

Antonio Machado estis proklamita akademiano de la hispana
lingvo, sed neniam li legis sian protokolatan diskurson, kiu devus inves-
ti lin kiel membron de la Akademio. Kunlabore kun lia frato Manuel li
verkis plurajn teatraĵojn, dramojn kiuj sukcesis, kiam ili estis publi-
ke prezentitaj.

Antaŭ kelkaj semajnoj, okazo de la kvindekjara datreveno
de lia forpaso, francaj kaj hispanaj ministroj, verkistoj, politikuloj
kaj elstaraj intelektuloj iris al la vilaĝo Collioure por omaĝi la aŭ-
toron de "Solecoj", "Kompleta Poemaro", "Elektitaj Paĝoj", "Novaj Kanzo-
noj", "La Milito", k.a. Se li estus vivanta, certe ke li ne estus apro-
binta tiajn publikajn elmontrojn... La poeto de "la sonora soleco" kaj
"la intimismaj kolokvoj" estis modesta sincera homo neŝatanta de pompoj
aŭ solenaĵoj. Li forpasis en Collioure, sola antaŭ la maro, kune kun
tiu hispana popolo ekzilita, kiu batalis kontraŭ la reakcio ĝis la fino
kaj kiel li profetis en sia poemo "Remportreto" li renkon-

tiĝis kun la morto kiel li deziris:

... Kaj kiam venos la lasta vojaĝtago,
kiam la ŝip'senretorna estu preta,
vi trovos min kiel la filojn de l'maro,
sen pakaĵoj, preskaŭ nuda, tutleĝera...

Jes, forpasis la poeto, sed lia poezio restos por ĉiam
kiel ekzemplo de simpleco, beleco kaj homamo.

Antonio Marco Botella

.....
(1) zelo: (el la latina zelum kaj el la greka zelos) delikata zorgo,
fervora mem dediĉo.

*Bonvolu ridi...
sed ne tro* 



Tiu ĉi rubriko ne pretendas esti
speciale ingenia aŭ inciti niajn le-
gantojn al tondra rido. Ni kolektas
kaj publikigas ĉi tiujn spritaĵojn ce-
lante nur, per distro kaj bonhumoro,
malstreĉigi la menson de niaj k-doĵ
(inoj) post atentado de "seriozaĵ"
artikoloj kaj stimuli ilin al legado
de la ceteraĵ.

Atentinda eraro.- Dum la goodziĝa vo-
jaĝo, juna paro veturis tra longa malhe-
la tunelo. Kiam reheliĝis, la edzino, kun
ruĝiĝintaj vangoj diris al sia edzo:
-Mi deziras, ke baldaŭ alia longa tunelo
venul-. - Kial do?- respondis la ed-
zo, -mi tre enuis tra la lasta tunelo-.
-Sed mia kara, ĉu ne estis vi, kiu tiel or-
de kisis min?-

.....
Alia eraro.- En strando sinjoro rimarkas, ke en la maro dronas virino,
kiun li opinias sia edzino.

Alarmite li vokas membron de la savbrigado: -Mi donos al vi cent mil pesetojn, se vi savas mian edzinon-

La naĝisto ĵetas sin en la maron kaj post momento li revenas kun senkonscia virino ĉe la brakoj.

-Jen via edzino, mi atendas de la promesitan rekompencan-.

-Jes, mi promesis cent mil pesetojn por la savo de mia edzino, sed tiu virino estas... mia bopatrino!

-Nu, komprenite- diris la naĝisto, kiom mi ŝuldas nun al vi?-

.....

Kuracisto konsilas al kliento:

-Ne zorgu tiom multe pri mono! Ĝuste antaŭ unu monato, alia kliento ne povis dormi, tial ke daŭre li memoris pri mono, kiun li ŝuldis al sia tajloro. Mi konsilis al li absolute forgesi tion, kaj nun li vivas tre feliĉa-

-Efektive, doktoro, mi konas ja tiun kazon, kiu portis min al la nuna stato, ĉar bedaŭrinde mi estas la tajloro de via anekdoto-.

.....

En la lernejo.-

Profesoro: -Nun vi jam scias, kio estas ŝafo, kaj por kio ĝia lano utilas-. -Diru al mi, Joĉjo, el kiu ŝtofo estas farita via pantalono?-

La lernanto Joĉjo: -El malnova pantalono de mia patro-

.....

Inter literaturistoj.-

-Ĉu vi scias, ke mia amiko poeto A.B.C. decidis, ke lia verskolekto ne estu publikigata ĝis post lia morto?-

-Jen lerta decido- diris verkisto B.X.X., -Tiel ĉiuj ja doziros, ke li longe vivadu!-

.....

En la ŝuvendejo.-

Vilaĝano iras en ŝuvendejon kaj petas paron da ŝuoj. La ŝuvendisto, vidante tiel grandajn piedojn, ekkriis:

-Ho, kia piedo! neniam mi vidis alian saman!-

-Ĉu ne?- diris la vilaĝano, -rigardu alian!- kaj naive montris la alian kun fiero.

.....

En juĝejo.-

La juĝisto: -Kie, antaŭe, mi vidis vin?-

La akuzato: -Mi havis la honoron doni kantlecionejojn al via filino-

La juĝisto: -Kvindek jarojn da punlaboroj!-

.....

LA LASTA LEKCIO DE UNAMUNO

Miguel de Unamuno y Jugo estis, ĝis 1936, agnoskita kiel fervora socialisto kaj respublikano, eĉ se li jam montris per artikoloj en diversaj ĵurnaloj, sian seniluziigon pro la manovroj de la maldekstraj partioj en la Parlamentejo, kaj ekster ĝi, dum la tagoj de la infana respubliko. Malgraŭ tio, en Septembro 1934, kiam li devintus emeritiĝi kiel rektoro de la Universitato de Salamanca, la Ministro pri Edukado nomumis lin dumviva rektoro. Poste, venis la ribelo de la generaloj en Julio 1936,



Unamuno, skulptita de Pablo Serrano.

kaj Salamanca, kie li loĝis, estis ekde la komenco sub la jugo de la ribeluloj, kaj la subteno kiun, ŝajne, li donis al ili. Mi diras ŝajne, ĉar malgraŭ la artikoloj kaj biografioj verkitaĵ pri Don Miguel, oni ankoraŭ ne poravade klarigas, kial li decidis paroli kontraŭ la respublika registaro en Madrid. Ni scias, ke li zorge verkis taglibrojn, en kiuj li komentis pri eventoj kaj siaj decidoj kaj pensoj. La plej granda parto de tiuj kajeroj ankoraŭ restas ne tuŝitaj de biografioj kaj historiistoj. Eble en ili troviĝas solvo al la mistero de tiu iam nomata "La lasta lekcio de Unamuno"...

Je la 12a de Oktobro de 1936 okazis ceremonio en la Granda Halo de la Universitato por festi la Tagon de la Raso. Sidante sur la podio estis pluroj gravuloj de la urbo, provinco kaj Universitato, ankaŭ reprezentantoj de la novaj aŭtoritatoj regantaj en Salamanca. Prezidis la ceremonion Unamuno kiel rektoro, kaj ĉe lia dekstra flanko sidiĝis Carmen Polo, la edzino de la ĵus elektita ĉefo de la ribela ĥunto (1), Francisco Franco. Ankaŭ troviĝis ĉe la alta tablo la generalo Millán Astray, reprezentante de la Armeo, José M^a Poman de la Akademio de la Lingvo kaj la episkopo de Salamanca. Post parolado

de pluraj gravuloj venis la vico de Millán Astray. Li parolis nelonge, laŭdante la batalantojn de la fifama "Legión", kiun li helpis formi en 1923, kaj, eble portita per la eŭforio de sia propra voĉo, li diris, ke ĝiaj soldatoj baldaŭ fortranĉos la du koncerojn de la hispana korpo, Vaskio kaj Katalunio; fine li salutis la "Legión" per ĝia slogano "Vivu la morto". Li sidiĝis kaj en la salono regis profunda silento...

Malrapide Don Miguel stariĝis kaj komencis paroli... Ne estas spaco ĉi tie por longe citi la paroladon, sed, resume, li kritikis la vortojn de la generalo kaj avertis lin, ke inter tiuj ĉe la alta table troviĝis kataluno: la episkopo, kaj vasko, li mem; fine li aludis al la vortoj "Vivu la morto", kiujn Unamuno kredis samaj kiel "Mortu la vivo" kaj aldonis, ke en la tiamaĵ cirkonstancoj, kiam tiom da hispanoj estis mortigitaj ĉiun tagon, oni devis voki ne la morton, sed la amon kaj la vivon.

Eksplodis la voĉo de Millán Astray kriante: "Mortu la inteligenteco!", kiun tuj Pemán korektis per la krio: "Ne, Vivu la inteligenteco! Mortu la malbonaj inteligentuloj!". Sekvis iom da tumulto kaj la ĉefo de la ĉeestantaj falangistoj donis la konatan krimon trioblan de tiu politika reĝimo.

Kiam la silento reaperis, Unamuno parolis pri la insulto juse farita al la Universitato kaj finis dirante: "Vi venkos, sed vi ne konvinkos" kaj sidiĝis. Tuj el la falangistoj volis tuj forporti la rektoron al milit-proceso, sed Carmen Polo staris kaj, premante la brakon de Unamuno, leviĝis lin de la seĝo kaj akompanis lin al sia aŭto.

La supra versio de tiu lasta lokcio estas tiu, kiun multe pli detale verkis Luis Portillo en la revuo "Juventud Española" de Decembro 1939, eldonita en Londono. Poste tradukita en la anglan aperis en "Horizon", Londono, en Januaro 1942, kaj ankaŭ en la antologio de noveloj kaj artikoloj de tiu revuo, aperinta sub la titolo "Golden Horizon" en 1953. Ŝajnas, ke Luis Portillo uzis sian version de 1939 en la libro "Vida y muerte de Don Miguel de Unamuno", kiun li verkis; ĉi tiu versio estis akceptita kiel vera fare de Ricardo de la Cierva en lia "Historia Ilustrada de la Guerra Civil" kaj ankaŭ de Rubio Cabeza en "Diccionario de la Guerra Civil Española". Tamen, Emilio Salcedo, en sia "Vida de Don Miguel" asertas, ke la eventoj priskribitaj de Portillo ne estas veraĵ kaj kiel pruvo li mencias, ke la ĵurnaloj de tiuj tagoj diras nenion pri la tumulto aŭ la riproĉoj fare de Unamuno. Ankaŭ:

li diras, ke li intervjuis ĉeestantojn kaj ke neniu menciis la vortojn atribuitajn en la versio de Portillo al Millán Astray, Pomán kaj Unamuno.

Ni konatiĝis kun Luis Portillo dum la fruaj jaroj de lia restado en Londono kaj ricevis la impreson, ke li estis en Madrido dum Oktobro 1936, de kiel li povis tiel detale verki pri tiu lasta lekcio? Dume, Salcedo verkis sian libron en 1963, kiam la cenzuro ankoraŭ ne entute malaperis, kaj citi ĵurnalojn de Oktobro 1936, aperintajn sub strikta cenzuro, kiel fonto fidinda, estas tute senvalora. Ĉiu konsentas, tamen, ke post la eventoj de la 12a Oktobro Unamuno estis demisiigita kiel rektoro, ĉi foje far la Hunto de Burgos, kaj ke li mortis je la 31a de Decembro 1936. Sed la "Lasta Lekcio" ankoraŭ restas iom enigma. Eble, iam ni povos legi liajn proprajn notojn pri ĝi, se ili ekzistas.

Amador Díaz

.....

.....

.....

.....

(1) Hunto: koterio de ribeluloj starigita por regi kaj administri ŝtaton post ribelo.

Nekrologoj

En Granada forpasis la patro de nia k-do Miguel Fernández Martín, aktiva membro de H.A.L.E. kaj kunredaktoro de tiu ĉi bulteno. Ni kondolencas nian bonan amikon kaj lian familion kaj tutkore esprimas al li nian simpatian okaze de tia malfeliĉo.

.....

.....

.....

.....

Kun bedaŭro ni ankaŭ sciis pri la forpaso en Madrido de Francisco Azorín Poch, katedra profesoro, elstara esperantisto, filo de nia k-do F. Azorín Izquierdo, eksdeputito de la Socialista Partio en la hispana Parlamento.

La forpasinto lernis Esperanton, kiam li estis aĝonaŭ naŭ-jara kiel lernanto de J.F. Berger, kaj tradukis al Esperanto interesan fakan verkon: "Plurlingva Terminaro pri Statistiko".

Kondolencan al lia familio.



Granada.- La pasintan monaton Aprilo Andalusia Esperanto-Unuiĝo estis invitita de la Muzeo Federico Garcia Lorca por prezenti du el la verkoj de la poeto tradukitaj al Esperanto de la kunredaktoro de "Kajeroj el la Sudo" k-do Miguel Fernández Martín: "La domo de Bernarda Alba" kaj "Sanga Nupto". En tiu aranĝo partoprenis la Komitato de HALE.

.....
Sevilla.- La prezidanto de Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj k-do López Hernández sendis cirkuleron al ĉiuj membroj, indikante la problemojn plej gravajn de la Asocio kaj invitante ĉiuj partopreni en la ĉi-jara kunveno okazonta en Bilbao samtempe ol la HEF-Kongreso.

.....

Monumento honore al D-ro L.L.Zamenhof.-

En Sabadell, kataluna urbo de Hispanio, oni komencis la preparajn laborojn por starigi monumenton honore al D-ro Zamenhof.

La monumento estos 12 metrojn alta, kaj konsistos el kvar metalaj kolonoj, kies simbolo estas: "Esperanto en la kvar ĉefpunkto de la mondo". Sur la plej alta kolono staros la kvinpinta stelo, kies dimensio estos unu-metra.

La kosto de la monumento superos sep milionojn da peseto kaj la laboroj por starigi ĝin daŭros proksimume tri monatojn.

Ĉe la piedo de la monumento oni surmetos reliefan vizaĝon de D-ro Zamenhof, kun memortabulo indikanta la gravan esperantistan eventon. La monumenton oni lokos en unu el la precipaj arterioj de la menciita urbo Sabadell, ĝuste en la "bulvaro D-ro Zamenhof" inaŭgurita en la jaro 1912.

Oni esperas inaŭguri ĝin en monato Septembro.

.....

.....

.....

.....

Bilbao. En la ĉefurbo de Vaskolando okazis la 49a Hispana Kongreso de Esperanto, de la 19a ĝis la 23a de Julio, en kies Ĝenerala Kunveno oni elektis la novan estraron de Hispana Esperanto-Federacio (HEF), kiu prezidas S-ro Antonio Alonso Núñez, de Santiago de Compostela. La Sekretariojoni starigos en Sevilo kaj la Redakcion de "Solito" en Zaragozo.

La kongresanaro konsentis pri jena poŝto al la aŭtoritatumuloj:

"REZOLUCIO DE LA 49a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO, OKAZINTA EN BILBAO
EN LA TAGOJ 19a ĜIS 23a DE JULIO 1989."

1) La esperantista kolektivo, ekzistanta jam de unu jarcento, konsistigas socian grupon interesiĝantan kaj dediĉatan al kultura tasko flegadi kaj uzadi la Internacian Lingvon Esperanto:

kiel tia socia grupo, ĝi ĝuas la samajn rajtojn al atento kaj protektado fare de niaj institucioj kiel la ceteraj sociaj grupoj dediĉataj al kulturaj aŭ alitipaj agadoj.

Tia atento kaj protektado ne okazas ĝenerale, kaj ĉiukaze temas pri relative diskriminacia atento.

Tial, la Kongreso kaj la plenrajtaj civitanoj kiuj ĝin konsistigas, petas kaj esperas de niaj institucioj, ke ekde nun, ili provizos al ili la bezonatajn kaj rajtajn atenton kaj protektadon.

2) La Kongreso konstatas, ke aldone al la homoj rekte aktivaj en la flegado kaj uzado de Esperanto, ekzistas kreskanta nombro de gejunuloj dezirantaj ĝin lerni sub la samaj kondiĉoj kaj akademia valideco kiel la ceteraj lingvoj.

Tial, la Kongreso petas de niaj edukaj aŭtoritatoj, ke ili faru la oportunajn aranĝojn cele al tio, ke en la kadro de la nunaj instruplenoj antaŭvidantaj la studadon de du fremdaj lingvoj, Esperanto iĝu plia elekto-alternativo por la lernantoj".

.....
KUNVENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ .-

Ankaŭ en la sama vaska urbo, kunvenis nia Laborista Asocio la 20an de Julio, je la naŭa mateno por debati jenan tagordon:

- 1.- Legado kaj eventuala aprobo de la antaŭa akto. (Julio 1988).
- 2.- Resumo aktivajtoj de la periodo Julio 88-Julio 89.
- 3.- Legado kaj eventuala aprobo de la bilanco 88-89.
- 4.- Resumo pri nia agado per "Kajeroj el la Sudo" kaj decidoj pri ĝia tujaj estonto.

- 5.- Kotizoj kaj ekzamenedo de niaj financoj.
- 6.- Programo por la venonta periodo 1989-90.
- 7.- Elektio de Komitato kaj sidejo de la Asocio.
- 8.- Petoj, sugestoj kaj demandoj.

La rezultojn de la kunveno oni povas resumi per tiuj ĉi koncizaj paragrafoj:

- a) La kunvenintoj aprobis la antaŭen akton.
- b) Oni decidis konfirmi la estraron kaj la redaktorojn en samaj postenoj.
- c) Oni esprimis dankojn al la redaktoroj de nia bulteno kaj instigis ilin daŭrigi la taskon en la redaktado de la gazeto kun sama entuziasmo.
- d) Oni aprobis la bilancan de niaj financoj, kiu prezentas jenajn bazajn ciferojn:



Kotizoj en 1988	0.850,-	Ptoj
Kotizoj kaj donacoj 89:	<u>29.114,-</u>	"
Entute sumas	37.964,-	"
Elspezoj ĝis nun ...	<u>15.669,-</u>	"
Restas je nia dispono:	22.295,-	"
=====		

Tiuj ciferoj, tute ne devas trompi niajn gek-ojn rilate al la pozitiva rezulto de niaj financoj en la ĵus finita periodo, ĉar granda parto de la unuaj elspezoj de la Asocio estis malavare pagitaj el la propra poŝto de ke kaj el niaj k-oj. De nun, la Asocio devas funkcii per siaj propraj rimedoj kaj, kompreneble, la afero ne solviĝos estonte tiel optimisme kiel ĝis nun. I tere, ĝis la fino de la jaro oni devos pristanti la pagojn de la bultenpresado urĝas la solidara helpo de niaj sis

patiantoj, kiuj esprimeble sin montros sub la formo de abonoj al la bulteno aŭ kiel novaj membroj de la Asocio.

Fine ni diru kiel resume de la kunveno, ke k-do fianou, lande peranto, reprezentis nin en la 62a SAT-Kongreso en Illertissen kaj ankaŭ antaŭ la diversaj LEA-oj. Ni do insistas, ke por elfronti la periklon 1989-90 ni ne nur bezonas monon, sed precipe la kunlaboradon, entuziasmon kaj kuraĝon de nia membraro.

La murdo de Garcia Lorka.



La sociopolitika radikaliĝo de kelkaj politikaj grupoj en Hispanio en 1936, la uzo de la perforto kiel nura sistemo por solvi la problemojn de la socio, kaj la influo de la tiranioj starigitaj dum tiu epoko en Italio kaj Germanio, ne nur grave eroziis la kunvivon de la hispanoj, sed enkondukis la landon al nura elirebla vojo: la milito.

Kiam en Februaro de la menciita jaro, la demokratoj venkis en la ĝeneralaj balotoj la reaktion konsistantan el militistoj, faŝistoj kaj certaj agresemaj dekstruloj, oni tuj komprenis per ilia viva reago, ke la civila milito estis neevitebla...

La 18an de Julio 1936 eksplodis tiu milito kaj nur unu monaton poste, ĵuste la 19an de Aŭgusto, Federiko Garcia Lorka falis murdita de la faŝistaj kugloj.

La poeto de Granada simbolis ĉion, kion la reakcio plej abomenis: la kulturon, la liberon, la popolan humanismon, ĉiujn aspirojn pri egalrajto kaj justeco. Individue, Lorka estis ekzemplo pri pensola intelektulo: lia vorto naskiĝis en la profundo de la homa spirito, en la humanaj sentoj kaj pasioj kaj ne kiel produkto de falsa intelektismo; kaj liaj versoj, plenaj de elegantaj metaforoj, kantis lirike popularajn rakontojn, dramojn popularajn, historiojn pri amo kaj morto, kioj tuj konkeris la popularajn korojn kaj la universalan admiron. Unuafaze post pluraj jersentoj, kiam la hispana teatro turnas prezentiĝis en placoj de urboj kaj vilaĝoj, Lorka foris la saman kaj vizitis kun siaj artistoj la plej apartajn regionojn de Hispanio. Tio fano, lando kaj eksterlanda estis tio kion la reakcio volis detrui mortigante la poeton. La reago al tiu murdo en la tuta mondo estis enorma. Multnombraj artikoloj kaj belej poemoj honoris al la mortigito ekfloris en ĉiuj libraj landoj...

Francisko Salinas, unu el la plej elstaraj poetoj de la hispana sudoriento, verkis en 1936 poemon, kiun mi prezentas hodiaŭ al niaj legantoj kiel dokumenton de l'pacinto:

KIAL ONI MURDIS LA NAJTINGALON.-

Nur ĉar ĝi mirinde kantadis
oni murdis la najtingalon!

Florplenas la blankaj karmenoj, (1)
ploras Granada senkonsolo,
puĝnoj vibrantaj kun kolero
postulas punvenĝon furoro.

Venas el vilaĝa turo
funebra plor' de sonoriloj,
larmas silentrista la luno
post la morto de federiko.

Eksonas gitaro: preĝanta
el kapricosreba fenestro...
La revaj kortoj de Alhambra
vibras en doloro kaj plendoj.

Via murdo, Garcia Lorka,
celis morton de kant'senmortal!

Inter la floroj bonodoraj
ne plu ekzistas rozoj blankaj:
ĉiuj fariĝis ruĝkoloraj
de sango el poet'giganta.

Ruĝsango el poet'popola
de brila najtingal'hispana
kies triloj mirinde sorĉaj
ĉarmis la genton liberaman.

Nur pro ĝia kanto senmorta
oni murdis la najtingalon!

Antaŭ mil junkokrucoj flavaj
juris la brunaj ciganinoj
kun vizaĝoj kolore palaj
venĝaci la sambro-kantiston! (2)

Ciganoj forgesas neniam
ekster la toizon'la tranĉilon,
nek sur la ĉeval'andaluza
lasas ciganan lankovrilon,
ĉar se cigan'pro malam'jures
kun rankot'el fund' de l'animo
la juron ili ja plenumas
sen atendadoj kaj sen timo.

Via murdo, Garcia Lorka,
trafis vin en horo plej glora!

Kiam via "Yerna", alloga,
sukcesis sur la franca tero,
kaj la Xirgu (3)mielparola
feris per sia artlerteco
viajn teatraĵojn tutmondaj
universalaĵ viajn versojn...

.....

.....

.....

(1) Karmeno: populara nomo de vilao en Granada.

(2) Sambro: antikva cigana rita danco.

(3) Margarita Xirgu: fama teatrartistino, kiu disvastigis tra la mondo, krom la hispanaj klasikuloj, la teatron de Federico Garcia Lorka.

Andaluzio, mia kara,
ne ploru: n'estas hor'bedaŭra!
Estas momento ideala
por batali pri mond'pli justa,
por art'pli libera kaj grava,
kiun federiko postulas
por la tuta gento hispana,
kun revoj pri paco plenluma
kun aspiroj pri mond'homama.

Hont'eterna al la krimuloj,
kiuj vundis korojn ciganajn:
kaj plorigis blankan lunon:
murdante birdon en Granada!

Ĉiuj gitaroj andaluzaj
ĉiuj fontanoj de Alhambra
disputis inter si ĵaluzaj
l'amon de la poet'afabla
kies poemoj oni aŭdas
dum sorĉesperoj en Granada.

La murdo de Garcia Lorka,
najtingalo universala,
plenigis de angor'dolora
ĉiujn korojn liberamajn.

Nur ĉar ĝi mirinde kantadis
oni murdis la najtingalon!!

Francisco Salinas
-1.936.-



LA KONSPIRO DE SILENTO EN U.E.A.

PRI ELSPEZOJ EN AFRIKO

Lastatempe en la gazetaro de Esperantujo aperis raportoj indikantaj, ke en UEA ne ĉio estas en ordo malantaŭ la porde. La plej oftaj plendoj rilatas al la organizado (aŭ misorganizado) de diversaj aspektoj de la Universalaĵ Kongresoj. Estas evidente, ke la verdaĵ burokratoj en Roterdamo ne tro diferencas disde siaj kolegoj ekster Esperantujo. Ĉu, do, valoras plendi? Malkovri misagojn? Postuli klarigojn? Verŝajne ne, ĉar ankoraŭ ne evoluis en la Esperanta komunumo sufiĉe potenca morala sinteno, kiu povas devigi homojn agi respondece. La Esperanta etiko -se ĝi vere ekzistas- estas nur por eksporto, t.e. propagandado ne por enoficeja uzo.

Ekde aŭgusto 1985 mi povis akiri informojn pri la elspezoj de UEA rilatantaj al la disvastigado de Esperanto en Afriko. Tiaj donitaĵoj neniel devas esti sekretaĵ aŭ konfidencaĵ, se la mono estis uzata honeste kaj la celoj pravigeblaj. Estas do, tre strange, ke la tiama respondeculo pri financaj aferoj en UEA, Grégoire Maertens, neniam digne respondi miajn perleterajn demandojn pri la uzo de la financaj rimedoj de UEA en Afriko. Tamas ne nur pri senrespondeco sed ankaŭ malĝentileco, ĉar mi skribis al li du fojojn en 1985, kaj atendis pacience dum pli ol duonjaro, sed Maertens ne respondis. Ankaŭ d-ro Ivo Lapenna amare informis min, ke tiu sinteno de Maertens ne estas unika. 'Li ĉiam rifuzas respondi ombrosajn demandojn kaj nur silentas. Kiel estas eble devigi funkciulojn de UEA plenumi siajn moralajn devojn kaj ne preterotenti en malestima maniero la sinceraĵn demandojn de membroj de la organizaĵo?

La 8an de Januaro 1986 mi sendis al la oficiala organo de UEA, "Esperanto", neformitan leteron al Grégoire Maertens, havantan la titolon "Kio okazis al la 30.000 guldenoj en Afriko?". Geoffrey Sutton, la antaŭa redaktoro de la revuo, rifuzis publikigi la neformitan leteron, kvankam li esprimis la vidpunkton, ke oni povas debati pri la elspezo de guldenoj en Afriko kaj aliloke. Cetore, Sutton naive supozis, ke mi jam ricevis respondon de Maertens. Mi konjektis, ke Maertens aŭ ne sciis, kiel la mono estis elspezita kaj hontis konfesi tion, aŭ li ja sciis, ke la mono estis disipita sed timis diri la veron.

Ankaŭ la redakcioj de aliaj Esperantaj periodaĵoj ne emis publikigi la neformitan leteron. Rezulto de la rifuzo permesis

liberan diskuton pri la demando, plifortiĝis la konspiro de silento en UEA.

Por ke legantoj de "Kajeroj el la Sudo" povu mem formi opinion pri la afero, jen la nefermita letero al Grégoire Maertens, kiu ankoraŭ atendas respondon:

Kio okazis al la 30.000 guldenoj en Afriko?..

Nefermita letero al S-ro Grégoire Maertens, la prezidanto de UEA.-

Veszprém, la 8an de januaro 1986

Estimata S-ro Maertens:

La 30-an de aŭgusto 1985 mi skribis al vi pri tre grava afero. Ĉar mi ne ricevis respondon, mi skribis denove la 26an de novembro kaj petis, ke vi sendu vian detalan respondon al mi ne pli malfrue ol la 31a de decembro. Jam forpasis tiu dato, kaj mi ankoraŭ atendas respondon de vi.

En la juna numero de "Esperanto" mi legis sur paĝo 113 pri la regiona agado de UEA. Estas dirite, ke en la pasinta jaro (t.e. en 1984) UEA "investis" pli ol 30.000 guldenojn por la Fondaĵo Azio-Afriko. La lasta parto de la koncerna alinea tekstas jene:

"Tie kaj jene en la movada gazetaro operas negativaj opinioj pri la nuna skalo de la regiona agado de UEA. Evidentas, ke tiuj homoj ne scias pri kia ili parolas".

La aludo en tiuj du frazoj ne estas tute klara, do mi petas pli da detaloj de vi. Ĉar vi okupiĝas pri financaj aferoj en UEA, mi estos danko, se vi povas informi min pri la preciza maniero, en kiu la 30.000 guldenoj estis elspezigitaj. Plue, kiuj estas la pozitivaj kaj daŭraj rezultoj de tiu investo?

Mi nuntempe kolektas donitaĵojn por ankoraŭ unu artikolo pri la provo enkonduki Esperanton en Afrikon kaj mi deziras pri-trakti en ĝi la elspezon de la 30.000 guldenoj.

Se ne estas ebla scii, kiel la koncerna sumo estis elspezita, bonvolu informi min pri tio.

Kun sincera salutoj,

Bernard Golden

Csikász u. 11. III.3

H-8200 Veszprém, - Hungario.

(dumviva membro de UEA)

NOTO.- "Kajeroj el la Sudo", organo de HALE, fondiĝis sub la inspiro de la SAT-idearo, kies ĉefprincipoj kuŝas en la socia kaj politika liberecoj. Malkaŝe, ni proklamas nian malplaĉon al sekretismo, konspiroj aŭ ia ajn alia obskurantisma sinteno kaj opinio kontraŭaj al la libera esprimo, sekve S-ro Golden trovis en nia libera tribuno spacon por sia plendo, tute same kiel povos ĝin trovi S-ro Maertens, se li konsideras malpravaj la asertojn de la nuna plendanto. Sen falsa neŭtralismo, ĉar nia opinio estas konforma al niaj principoj, ni aŭskultas ambaŭ, kaj se neceso, ni oportune esprimos nian vidpunkton.

ABONPREZOJ DE KAJEROJ EL LA SUDO

Per diversaj leteroj ricevitaĵ de ni en nia Redaktejo, esprimantaj intereson pri nia bulteno, oni demandis nin pri ĝia periodeco kaj la abonprezo unujara.

Pri la unua, t.e. la periodeco, ni diru, ke tio dependas ĉiam de niaj financoj, do konforme al tiaj ebloj ni aperigos la gazeton, minimume du kajerojn. Rilate la prezon de la jarabono, ni indikas unue, ke por senlaboruloj kaj pensiuloj, tiuj kolektivoj povas individue skribi rekte al nia Redaktejo de Zaragozo, kaj ni komplezos al ili kontraŭ laŭvola donaco. La ceteraj k-doĵ pagos laŭ la jena kotiztabelo:

Jarabono por hispanoj (ne membroj de SAT)	800 Pesetoj
" " francoj	50 Fr.Fr.
" " belgoj	290 Fr.belg.
" " germanoj	20 Gmk.
" " italoj	0.500 it.liroj
" " svisoj	15 Sv.fr.
" " nederlandanoj	22 Guldenoj
" " avedoj	55 Sv.kronoj
" " portugaloj	800 Ĉskudoj
" " aŭstroj	110 Ŝilingoj
" " britoj	6 £
" " hispanoj de la ĉiunmonata organo de SAT	

"Sennaciulo" kun membreco 1.800, Pesetoj

- a) La hispanaj SAT-membroj pagos saman kotizon kiel pasintjare.
- b) Por aliaj k-doĵ el diversaj landoj, kies valutoj ne operas en tiu ĉi Tabelo, ili mem faru la koncernan kalkulon rilate la indikitajn kaj sendu la ekvivalenton.
- c) Ni rekomendas al niaj eksterlandaj abonontoj sendi la monon al ni, nepre, per poŝtĉiro, ĉar pore de banko (aŭ dokumento ŝanĝebla en banko), la minimuma procentaĵo postulata de tiu formantaĵas la tutan sendaĵon.
- d) Pagojn sendu al nia Asocia adreso en Sevilla aŭ al nia Redaktejo en Zaragozo, ĉiam adresita al la koncerna respondeculo.

Ni petas de niaj gekamaradoj solidare helpi nin per la indikitaj abonoj, fakto de ili dependas nia supervivado. Dankon.

La Redakcio.



Illertissen.— La 62a SAT-Kongreso okazis tiu ĉi jaro en Illertissen (Uvario) de la 5a ĝis la 12a de Aŭgusto 1969, kun 260 partoprenantoj el 31 landoj el la kvin mondopartoj, kiuj aprobis jenan DEKLARACIION:

La kongreso

-konstatas, ke konfirmiĝas la pozitiva evoluo al pacoj rilatoj inter Usono kaj Sovet-Unio kun, inter aliaj sekvoj, la tendenco al solviĝo de multaj lokaj konfliktoj en la mondo;

-observas, la strebado de la sovetiaj ŝtatinstancoj al starigo de pli libera socio en federitaj respublikoj kaj esperas, ke la legitima penado de tiaj subpremataj minoritatoj al pli da libereco tamen ne vaniĝos la jam konstateblan pozitivan evoluon;

-subtenas precipe la luktojn kiujn gvidas la popoloj mem favore al sia emancipiĝo;

-salutas la pozitivajn ŝanĝojn en direkto al demokratio en Pollando, Hungario kaj aliaj orientblokoj landoj, esperas ke ili favoros la pligrandiĝon de la SAT-membraro kaj bedaŭras, ke aliaj, ekz. Rumanio, restas ankoraŭ sub stalinisma reĝimo;

-konsideras la ĉi-jaran aparte tutmondecan partoprenantaron en la kongreso kiel kuraĝigan antaŭsignon de la sopirata plivastiĝo de la laborista Esperanto-movado en la mondo;

-firme kondemnas la subpremadojn (masakrojn, arestojn, ekzekutojn) de la studenta movado kaj ĝin subtenanta popolo fere de la ĉina registaro kaj la ĉesigon de la tia demokратиiĝo;

-subtenas la luktojn, en la kapitalismaj landoj, kontraŭ senlaboreco, la nestabila dungiteco, precipe por la gejunuloj.

La kongreso ankaŭ konsentis pri jena

G V I D E Z O L U C I U :

La 62a kongreso de SAT

-esprimas la eseron, ke la aliĝo de signifa nombro da homoj al SAT skatos ebleco fondi fortajn LEA-ojn en Sovetio, samkiel en aliaj

orientaj landoj;

-notas la onon al restarigo de komunisto kaj de sindikata frakcioj al revigligo de la senaciista, al fondo de ekologiista kun la celo pliriĉigi nian movadan vivon;

-deziras, ke SAT reprenu unu el siaj plej gravaj klerigaj taskoj, nome la eldonadon de tiaj gravaj verkoj kiaj estas PV, PIV aŭ aliaj kaj la publikigon de urĝe aktualaj dosieroj;

-rekomendas pli efektivan kunlaboron kun la perantoj per instigi ilin, en la ĝusta politika momento, ulprofiti favoran situacion por plivastigi la SAT-anaron;

-sugestas vigligon de la konsilantara reto, ĝisdatigon de ties listo kaj sekve plialtigon de la laŭstatuta rango de la konsilantaro;

-apogas la agadon de la Amikeca Reto kiel specife porlaboristan socian turismon servantan al la SAT-bezonoj;

-esperas, ke la organizantoj de la venontaj kongresoj povos efektiviĝi la proponon igi ilin daŭre variaj (ekz. per kurso por komencantoj kaj prezento de nia movado al la ekstera publiko) kaj ankaŭ malpli kostaj, kio precipe gravas por la junulero.

.....

Irano.- Survoje al Indonezio, D-ro Ulrich Lins haltis en Irano, invitata de iranaj respondeculoj universitataj. Li prelegis antaŭ pli ol 80 goesperantistoj, kiuj entuziasme aplaŭdis la doktan paroladon de nia samideano.

.....

Israelio.- En tiu Mezorianta lando oni instruas Esperanton en certaj lernejoj al infanoj preterpasantaj la mezan intelektan nivelon. Per letero-cirkulero sendita al Izraelia Asocio de Instruantoj, la ministro pri Edukado emfazis la utilon kaj gravecon de la Esperanto-instruado.

.....

Germanio.- En la kadro de la 62a SAT-kongreso okazinta en Illertissen, nia kataluna k-ko Juan Monou, filo de la hispana tutlanda paranto, partoprenis en kultura programo kiel pianludisto kun du aliaj kolegoj. Multaj el ni sufiĉe bone konas la lertecon de la juna Joan kiel muzikisto kaj ne dubas, ke li sukcesis, kiel en antaŭaj okazoj.

.....

Sovet-Unio.- De nun estas oficiale permesata en Sovet-Unio S.E.U. (Unuiĝo de Esperantistoj el la Sovetoj Respublikoj). Kiel niaj kdoj sendube scias, tiu samtitola Asocio estis malpermesita de Stalin en 1938. La nuna prezidanto estas k-ko Wladimiro Samodaj, ĵurnalisti.

.....



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str. Av. Compromiso de Caspe, 26, 1º
50002 -Zaragoza (Hispanio)
